

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

Enhavo:

Asen Grigorov: Esperanto - hejmo.

„ „ Mia lando.

Zahari Zahariev: Al Hristo Botev.

M. Uŝaev: La lasta tago.

G. Batakiev: Fabelo.

G. Sapunĝiev: Rememoroj pri Nürnberg.

A. Grigorov: In memoriam.

Ada: La paroloj de l' Sperto.

K. Konov: Letero el Esperantio.

Pri E -bibliografio.



J U S A P E R I S

№ 1 de biblioteko „Bulgara Esperantisto“

ESPERANTA SINTAKSO

(por bulgaro.)

La libro ampleksas 6 presfoliojn presitajn per malgrandaj presliteroj; speciala papero geritt.

Tiun ĉi libron devas nepre posedi ĉiu bulgara esperantisto.

ESPERANTA SINTAKSO estas liverata de la Societo kontraŭ antaŭpagitaj 22 (kun sendelsp. 25) lv.

Alilandaj samideanoj povos ricevi la libron kontraŭ 1.50 fr. sv.

AMIKA FUNEBRO

Ankoraŭ unu juna vivo pereis sub la kruda premo de la malhela kaj kruela Hodiaŭo — nia kara amiko

IORDAN LEVIĈAROV

(Studento - Agronomo, naskita en Kara - Musal) la 2. VI. 1926. memvole disŝiris la kurtenon post kiu sin kaŝas la eterna Mistero kaj transiris tien.

Dormu en paco, kara Samideano!

Unu el la belaj ideoj, al kiu vi dediĉis vian mallongan surteran vivon estis ankaŭ nia amata Esperantismo. — Daŭrigante plue nian laboron, ni ĉiam konservos karan memoron pri vi kaj pri via frata kunlaborado.

Sofia, 4. VI. 1926.

DE LA STUDENTA
ESPERANTISTA SOCIETO

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO :
por Bulgario
40 levoj,
por alilando
2⁵⁰ sv. fr.
aŭ egalvaloro

MONATA ORGANO
DE LA BULGARA ESPERANTISTA
SOCIETO

Adreso
de la Redakcio
kaj administracio:
Sofia (Bulgario),
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lerneĵ-bibliotekoj
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

Esperanto - hejmo

Mi ne kredas, ke iu povus prezenti al si la tutan signifon, kiun povus havi la konstruo de propra Esperanto - hejmo. Esperanto - hejmo! Fantazio! — eble kelkiu diros.

Sed ja la realaĵo mem igas nin fantazii.

La kancelario havas du konstantajn pagatajn oficistojn, kelkafoje volonte samideanoj ankaŭ oferas horon aŭ du horojn aŭ eĉ duontagon por helpi, ĉu ligante pakaĵojn ĉu surskribante adresojn de ambaŭ presorganoj.

Al tio oni devas aldoni grandan nombron da vizitantoj, ĉiu venanta pro malsama laboro. Tio jam postulas oportunan kaj sufiĉe vastan ejon. Sed, krom tio:

La Bulgara Esperantista Societo fakte havas propran eldonejon, kiu ĉiam pli kaj pli kreskas. Jus estas metata la fundamento de nove - eldonota biblioteko de esperantaj kaj priesperantaj libroj, kaj ĝi espereble estos unu bona kaj grava eldonaro. La eldonejo devus havi sian apartan ĉambron. Eĉ nun jam la aroj da lerno -, lego - kaj aliaj libroj ĉiam pli kaj pli malpliigas la aeron en la nuna provizora kancelariejo. Kaj se la societo povus havi propran librejon, kiu povus vivteni sin mem (vidu aliajn kultursocietojn kun propraj artiklovendejoj) — ĝi multon profitus — kaj la samideanaro ankaŭ!

Antaŭ miaj okuloj aperas la perspektivo pri estonta presejo — eble post du aŭ tri jaroj. Samideanoj, ni estu klarvidaj! Tiuj entreprenoj ne pre postulas ke ni havu propran domon! Sen tia ili ne estas efektiveblaj.

Pri lukso mi ne volas paroli. Ekz. pri Esperanto - biblioteko kompleta kaj utiligebla por la tuta lando kaj funkcia kiel kulturoficejo ĉe la Societo — kvankam ĝi ne lukso estas, sed bezonaĵo. Germanio, Francio, Svisio k. a. jam havas tiajn bibliotekojn. Aŭ — legosalono, ejo por kursoj, samtempe servantaj kiel dormejo por preterpasantaj samideanoj en - kaj eksterlandaj.

Ja la Sofia sekcio povus doni la lupagon de sia nuna neoportuna klubo al la Societo, anstataŭ al privatulo.

Kaj krom la materiala, kiel granda estus la morala signifo, se la afero sukcesus! —

Nu, ni estu modestaj. Ni ne tro fantaziu. La aktuala realaĵo krias al ni, ĝi ne toleras prokraston.

Ni helpu la konstruon de propra Esperanto - hejmo en Sofia!

Asen Grigorov

ESPERANTAJ POETOJ

MIA LANDO

*

Fluas la rivero
pace tra la land,
sur la blua tero
blanka la ruband.

La kvietaj ondoj
flustras inter si:
kien ni irontaj
se ne tien ĉi?

Jen la paradizo
vera sur la ter,
kvazaŭ Dia kiso,
kvazaŭ sonĝkimer.

Jam fandiĝas mole
lasta sunradi,
jam ripozi volas
mem la bona Di.

Venas la vespero
lule sur la land,
fluas la rivero —
blanka la ruband.

*

Kiam estis ni tutjunaj, ĉu memoras vi? —
ni nin amis tiel flame, tiel ardis ni!
Via okulparo estis pli profunda ol violo
kaj ol silko pli alloga estis via buŝo mola.

Nia amo estis pura, ni nur sciis ĝin,
kaj la bonaj noktaj steloj sur ĉiela sin'!
Se vi flustris aman vorton — plaŭdis longe la torento,
kaj ĉe ĉiu kiso via tikle nin karesis vento.

La lazura firmamento, alta kiel Di,
ĉiam nin bonkore ridis — ĉu memoras vi? —
kaj akceptis tiel ame niajn ĝemojn kaj sopirojn
kiam, mutaj, brak' ĉe brako, ni ĝin gloris en admiro . . .

Kaj en blondaj ondoj falis — ĉu memoras vi?
via silkhararo, ora kiel sunradi!
Kaj la tuta mondo estis nia templo kaj preĝejo,
kaj sur nin ĉiumomente gutis Dia sanktoleo.

Kiam estis ni tutjunaj — ĉu memoras vi? —
ni nin amis tiel flame, tiel ardis ni!
Ah, ne memorigu pri la tempo kara kaj beata,
kiam floris nia junco, kiam vivis vi amata!

*
Stranga lando, stranga . . .

Nur da surda bru!

Kial ruĝe sangas
mia koro nun?

Jen: arbaroj kuras

post la landa lim!

Supre Dio hurlas —

hej vi, preĝu lin!

Pasas nudpiede

nigra hom — ermit:

ankaŭ vi procedu

kiel la ermit.

Venas nigra nubo,

ŝaŭmas la river,

en ruin' kaj rubo

estas tuta ter!

La tempesto pasis,

pasis la preĝant,

malamik frakasis

nin en nia land.

*
Galope kaj salte

malalte kaj alte

kuregas ĉevaloj —

Ah, ili nin volas atingi en kur,

frakasi —

forpasi . . .

Nu, fugu la hufojn, se povas, mizeraj vi,
 polvo kaj sango sin miksas en homkrani'.
 Kuras ĉevaloj tra l' ŝtupo malpaca,
 flirtas la haroj ĉevalaj minace.
 Estas sendata al Dio la krio:
 Ho vi, trompinto, malbenon al vi!
 Nubo da polvo sur nin sin ekportas,
 Estas finite!
 En aĉa, terura grimaco la homo,
 la homo, la Diosimila formortas.

*

Estis la spektaklo stranga, kiam homon hom ne vidas,
 kiam urbojn kaj vilaĝojn oni en terur evitas,
 kiam elementoj krudaj regas en la universo
 kaj nur oni aŭdas bruon kaj detruon kaj renverson.

Tiam Dio, nia Dio, per la sango kaj la morto
 ebriiĝas kaj de sia trono diras al ni vortojn
 de frenezo homa... Tiam ni malŝatas la ekziston
 kaj el la utero tera venas mem la Antikristo.

Oni ne plu trovas hejmon en la sin de l' Monto giganta —
 mem ĝi estas skuegata kune kun la tuta lando,
 kaj nenie estas baro, kaj nenie — ter malmola,
 kie oni povus trovi rifuĝejon kaj konsolon.

Tiam venas la koboldoj kaj per vipoj kaj per batoj
 ili murdas la senkulpajn kaj turmentas sen kompatato.
 La gravedajn inojn ili en la ventroj mem trapikas,
 kaj infanojn, maljunulojn ili ligas kaj bruligas.

Kaj de l' tuta gento restas eĉ ne plej malgranda signo
 kaj ne estas plu protesto, kaj ne estas plu indigno.
 La detruo ĉion skuis kaj pacigis poretenne
 kaj la vastaj ebenaĵoj nur sin en silento sternas...

Asen Grigorov

AL HRISTO BOTEV

Venis subita aŭtuno,
 kruda, kruela, terura.
 En okcidento la suno,
 fremda kaj stranga,
 verŝas ne lumon purpuran,
 sed sangan!

Kaj en maldolĉa sufero
 venas funebraj knabinoj —
 kantoj jam mankas!
 Ili rikoltas vinberojn.
 Gutas el ili ne vino,
 sed sango.

Ĉar dum ribelo idea,
 en porlibera batalo
 fratoj iliaj pereis.
 Nun sur la vangoj
 fluas ne larmoj kristalaj,
 sed sango.

Jame la greno semita
 ĝermas en sulkoj kaj fosoj.
 Sur la kamp' senhomigita
 ho, sorto stranga,
 falis abunde ne roso
 sed sango.

Estas fekunda la grundo
 kie kadavroj putriĝas.
 Venos somero.
 El sang' fluinta el vundoj
 dum la rikolto naskiĝos
 Libero.

Zahari Zahariev

La lasta tago

La neĝeroj falas kaj kvazaŭ ian reton ili plektas en la aëro. Dum momento aperas buleĝoj kaj onde ilin disen blovas sur la domtegmentojn tra la blankiĝintan teron la vento. Poste ree venas la trankvilo, denove la neĝeroj ekplektas sian reton.

La vilaĝo estas dezerta. Malofte vidiĝas rapidanta, vindita en ĉifonoj virino, kiu kuras por akvon preni.

Subite aŭdiĝas longa voĉo, tra la neĝeroj sur mallarĝa kaj profunda strateto aperas areto da homoj. Jen ili estas proksime. Kvar homoj — tri viroj kaj unu virino, portas ĉerkon kun tegita mortinto.

Ĉi-matene li mortis. Eble li naskiĝis dum hela, gaja tago. Kaj poste longe li vivis, multon travivis. Iam li estis juna, plena je vivfortoj kaj espero por la estonteco.

Ĉio forflugis. Fine venis la lasta horo. Aperas ĉefanĝelo, eligas sian ponardon kaj prenas la sion.

Interesa estas ja la mistero de tiu momento. Sed oni ne devas bedaŭri, ke neniam oni ekscios, divenos ĝin. Forpasas la minutoj, la horoj kaj la tagoj, la lasta tago proksimiĝas. Ĉi ne-
 pre venos.

Eksonoris la sonorilo. Aŭdiĝas la pastra mortkantado; ĝi baldaŭ finiĝas. Rapide aliras la areto, post momento ĝi dronas en la grizan kaj ondeman reton de la neĝeroj. Oni enterigas la mortinton.

Ho! delonge li ne ekzistas. Eĉ lia tombo post horo ne estas jam trovebla.

La vilaĝo estas dezerta. La neĝeroj per neperceptebla flustro rakontas ian misteron kaj plektas sian nefinplektitan retaĵon..

v. Obidim.

M. Uš a e v

Fabelo

Al Violeta

Iam, tie malproksime estis ĝi — la valo de la silento kaj de la kvieta ĉagreno. Tie, oriente, de kie leviĝas la ora suno, de kie ĝi sendas helajn radiojn kaj fajran lumon al la tuta mondo. Tiel malproksime estis ĝi de ĉi-tiu mondo, ke neniam bruoj aŭ krio atingis ĝin kaj rompis la solenan trankvilecon tie, kie sanktaj diroj eliris la buŝon de unu, diroj, forportiĝantaj supren, al la hela lazuro...

Tiel ĉarma, tiel magia, estis ĉi-tiu malgranda valo kun siaj belaĵoj. Tie floradis primoloj, mirtarboj kaj oleandroj, kies trunketoj iomete balanciĝis de l' trankvila venteto. Rozoj kaj violoj bonodorigis la valon de l' silento.

Sed floroj aliaj floris sur la altaro Lia, floroj rapide kreskanaj kaj dediĉitaj al la diino — Amo.

Malgranda rivereto fluadis tra l' valo. Ĝiaj akveroj murmuris sur kaj inter la ŝtonoj verŝiĝante malsupren... Lia fonto estis tie, kie li dediĉis siajn oferaĵojn al la diino. Tiuj akveroj de l' rivereto similis la larmojn de l' fidela servanto en la valo de l' silento, kiuj larmoj kiel perloj surfalis la altaron, kie kreskis la sanktaj floroj. Samtempe la rivereto disportadis per siaj akveroj la preĝojn kaj la susuron de Lia voĉo tiel belsona inter la komuna ĉirkaŭa silento, voĉo alportiĝanta ĉielen...

Lia altaro ĉiam bruletis. Oni vidis lin frumatene kaj meznokte tie preĝanta kaj genufleksanta antaŭ ĝi inter la reganta trankvileco en la valo. Oni vidis lin ĉe la unuaj sunradioj, kaj ankaŭ kiam la orruĝa luno malleviĝis sendante siajn lastajn ekstremantajn brilojn sur la dormetantan naturon magie vestitan per la vestaĵo de l' verda nokto. Inter ĉi-tiuj cirkonstancoj estis tiu junulo kun blondaj orumitaj haroj, kiuj bukle surfalis lian frunton kaj aldonis al li mildan ĉarmecon. Lia vizaĝo estis hela kaj samtempe sur ĝi oni rimarkis enuon kaj suferon. Li fiksis sian rigardon ien en la ĉielan bluaĵon pensante kaj revante pri io majesta kaj grandioza. Tiel sola estis Li en la valo de l' silento kaj de la kvieta malĝojo. Lia amiko estis la naturo mem: la floroj, la birdoj, la rivereto kaj ĉio alia en la valo. Kelkatempe lin ĉirkaŭis nebuleto dissaltiĝanta iom post iom sur la floroj de Lia altaro... Tiam li ekrigardis ĉielen, dediĉante ĉion sian al sia amata diino - Amo, kontenta je la glorkrono, kiun sendis ŝi al Li...

* * *

Silento regas nun super la valo. Nur la akveroj de l' rivereto murmuretas sur kaj inter la ŝtonoj irante malsupren. Ĝis nun ĝiaj akveroj ankoraŭ ne sekiĝis. Ili portas la larmojn de Liaj okuloj por akvumi la florojn kreskintajn iam sur Lia altaro, dediĉitajn al la diino - Amo.

Varna

G. Bataklijev

G. Sapunĝiev

Rememoroj pri Nürnberg

Tagmezo. Ĝis la dua estas ankoraŭ horo. Grigorov do havas unuhoran liberan tempon. Ni kune promenas kaj eniras lian kancelarion. Li legas „Liberon“ kaj al mi donas kelkajn esperantajn revuojn, por ke mi ne enuu...

Mi ne legemas — mi nur okulumas supraĵe, rapide ĉiujn esperantaĵojn.

En malgranda libreto mi vidas la nomon de Ed. Grot.

— Eduard Grot!.. Mi konas tiun ĉi homon... kaj mi ride interrompas la legadon de mia kamarado...

— De kie vi konas lin? Kiel vi konatiĝis kun li?... demandas min Grigorov, kaj liaj okuloj mire ŝercas...

— Nu, kiel... de Nürnberg!

— Ĉu vi estis tie?

— Ho... jes — kompreneble...

— Ja... vidu, skribu, vi, priskribu viajn tiamajn impresojn... Ili povus aperi en „Bulgara Esperantisto“... interese estus...

Mi enpensiĝis — kaj mia gajeco pasemis...

— Iom malfacila afero estas nun, post tri jaroj rakonti miajn impresojn... Krom tio, mi multon forgesis... Ja la kapo mia bedaŭrinda ne ĉion povis encerbigi...

— Nu... provu!...

— Ĝis revido... estas jam dua.

— Ĝis revido...

* * *

Mi promesis, kaj miaj rememoroj estos bezonaj por „B. E.“. Samideanoj, ĉu vi scias kiel ŝarĝe, kiel peze estas skribi „laŭ mendo“...

— Kial vi promesis? diras al mi mia duoblulo... Ĉu vi ne scias ke via kapableco rakonti estas tiel malgranda?... Vi povas rakonti al infanoj diversajn fabelojn... antaŭe de vi legitajn... Ĉu vi ne scias ke — vi scias nur unu lecionon pli ol viaj lernantoj?...

— Vere . . . kial mi promesis? Nun mi tenas la plumingon, ĉirkaŭmordetas ĝian supran pinton kaj pensaĉas . . .

. . . Ho, jes . . . pri Nürnberg! Samideanoj, ĉu vi scias, irante al kongreso fremdlanda, internacia — oni devas havi kelketaĝan cerbon. Kiam la unua etaĝo pleniĝas je impresoj, vi malfermas la duan k. t. p. . . .

Ĝis nun mi bedaŭras kial mi ne plenumis tiun ĉi gravan regulon! — Mi devis havigi al mi kelkajn cerbojn el apoteko, aŭ almenaŭ pruntepreni la cerbon de mia impresema panjo . . .

— Tamen . . . jam estas malfrue . . . Malfrue oni plisaĝiĝas. . .

* * *

Tutan jaron mi vivis, laboris, instruite vilaĝajn infanojn kaj iu voĉo konstante flustris al mi: al Nürnberg! . . . al Nürnberg! . . . Pretiĝu! . . .

Sur kartono granda mi estis strekinta kelkajn strekojn dikajn nigrajn „monatajn“ . . . Tiu kartono pendis kontraŭ mia lito. Matene leviĝante mi kalkuladis la strekojn kaj je la fino de ĉiu monato mi viŝis, malaperigis po streko, kaj ĝoje mi pensis pri la tempo kiam sur la kartono neniam streko restos — —

Vilaĝanoj, kiuj venadis ĉe mi, vidinte tiun strangan kartonon mire demandis min — kion ĝi signifas — —. Mi devis elpensi diversajn belmensogojn . . .

— „Ĝi signifas la staton de nia terkulturado“, aŭ „Ĝi montras la bonan konduton de ĉiuj infanoj poklase“ . . . tamen la veron neniu eksciis . . .

Ja neniu havas la rajton perforte aŭ belrimede vidi vian internan animan muzeon, aŭ konatiĝi kun viaj pensoj . . .

Ŝajnas, ke la lerneja servisto divenis kaj miris kial la strekoj unu post unu malaperas . . .

Foje mi aŭdis lin kiam li klarigis al iu vilaĝano la miraklan signifon de la kartono . . . La aŭskultinto ne komprenis: — Ĉiu estas aparte freneza — — kaj pleje la instruitaj —

Finfine restis duona streko kaj mi revenis en Varna.

Lerneja ferio! — —

* * *

De Sofio al Nürnberg ni ekiris grandare, mi ne memoras la tutan nombron de la kongresintoj. Ni veturis ĉiuj en unu vagono kaj interrilatis tre familie, parence.

Estis kelkaj fraŭlinoj — de longe memorantaj fraŭlinecon — al kiuj dumvoje ni ĉiuj ŝerce diris „onkloroj“, kaj anstataŭ „fraŭlino“ aŭ „samideanino“ ni ĉiam diris al ili simple: „onklino“ — „onno“ — —. Kaj ili efektive estis tre bonaj, tre komplezemaj onklinoj . . .

Mi kaj eble ĉiuj kongresintoj, ŝuldas al ili dankegon . . . Bone, gaje kaj amuze, senlace amuze ni pasigis la vojaĝon ĝis Beograd.

Tie nin renkontis serbaj samideanoj. Kun ili ni promenis kaj supraĵe konatiĝis kun ilia ĉefurbo. La renkonto kaj la di-

siĝo estis tre sinceraj, tre ĉarmaj... La slavoĵoj — la bulgarioĵoj kaj la serboĵoj — parolas pri gravaj, malgravaj kaj superfluaĵoj aferoj... Ĉiuj pepas esperante. La vagonaro ekmoviĝas... ekiras. La serbaj samideanoĵoj restas kaj svingas verdajn standardojn —.

— Ĝis revido — Vivu Esperanto! kaj aliaĵoj bondeziroĵoj, krioj fendas la aeron — — —.

Zagreb! Rea renkonto! Kroataĵoj samideanoĵoj nin atendas! Tamen la poliestro ne permesas al ni malsupreniĝi nek al ili envagoniĝi — —. Do, tra la fenestroĵoj ni parolas —. Ili donas al ni floroĵojn, cigaredojn kaj bukedojn kun verdaj rubandoĵoj —. Kiel amike, frate, kiel parence vivas la esperantistaro. Ni interkisis nin kaj emociiĝis pro ĝoĵoj...

Ĉu estas alia nacio pli flamiĝema, pli sentema ol la slavoĵoj, mi ne scias — —. Kvazaŭ Dio donis tion nur al ni — —. Kvaronhoron ni pasigis tiel... Ni ekfumis — —. Mi ankaŭ ekfumis kaj finfumis du cigaredojn —. Ja ĉiuj estis „devigitaj“ fumi kaj finfumi la donacitajn cigaredojn. La lastan cigaron ĝis nun mi gardas en mia trezoreĵo... kara rememoro!...

Sur la perono tiel multaj bonaj homoj, fraŭloĵoj, knabinoĵoj, geviroj... Nenies nomon mi rememoras nun. Mi rememoras nur pri unu Radiĉano, mezaĵa brunulo. Kun li en daŭro de kvaronhoron „ni flariĝis“ kaj interkompreniĝis pri estonta porslava fratiĝo kaj plibonigo de niaĵoj sudslavaj interrilatoĵoj —. Venis poliestro kaj „petis“ la kroatoĵojn adiaŭi kun ni kaj disiri.

Mi aŭdis lian parolon serban, kaj ĝin komprenis — Bedaŭrinde, mi ĝin komprenis... Li diris: — foriru tuj, la bulgarioĵoj estas politike malsanaj homoj — — Oni ne bezonas ilian amikecon, intimecon... Domaĵe, ke mi ĉion komprenis... Ĉiuj disiris. La vagonaro ekiris. Reaj adiaŭaj paroloĵoj laŭte aŭdiĝis en la Zagreba stacidomo.

La radoĵoj vagonaraj ekmoviĝis grunte, kaj post ĉiu movo longdaŭre en miaĵoj oreloĵoj sonoris: ... politike malsanaj... politike malsanaj... — Mi eksentis ian doloron kaj per larmoj, per ploro mi volis sufoki ĝin... Mia rigardo pormomente haltis sur la donacitaj bukedoj kaj ili redonis la ĝojon perditan!... Vivu la floroĵoj... vivu Esperanto... —

* * *

Vieno! La koro de Eŭropo! Vieno, fabela feino alloganta ĉies junulan koron... Vieno — gloreĵo de pasintaj jarcentoj! Trezoreĵo de riĉaĵoj, belaj antikvaj valoraĵoj... Vieno, efektiviĝanto de niaĵoj riĉaj porestantaj revoĵoj... Via grundo estas la plej favora por ĉiuj semoj kaj por ĉiuj ideaĵoj semoj...

Pri Vieno mi ne skribos. Mi sentas ke mia plumingo rompiĝos! Tion faru niaĵoj samideanoĵoj vizitintaj la XVI-an! — —

Pasiginte kelkajn tagojn en Vieno ni ekvojaĝis al Nürnberg. La nombro de la kongresantoĵoj ĉiumomente pligrandiĝadis — La esperanta parolo senĉese sonis en la vagonaro, en bufedoj, en

stacidomoj... kaj certe eĉ la surdemutaj komprenis ke okazas la XV-a Esperanto-Kongreso — — —

Preskaŭ tuta vagonaro plena de esperantistoj —. Ĉeĥoj, serboj, hungaroj, aŭstroj, poloj —. Kaj la tuta nia bulgara familio de onklinoj kaj „fraŭlegoj“ dissemiĝis inter tiuj fremdlandaj esperantistoj —. Ĉiuj volis paroli kun fremdlandaj esperantistoj —.

Ja se bulgaro parolas esperante kun bulgaro estas iom facila afero... Ambaŭ pensas ke la unua superas la alian per siaj lingvaj konoj...

Finfine, mi vidis, komprenis, ke ankaŭ tiuj fremdlandaj esperantistoj scias diversgrade la lingvon. Iuj ĝin parolas kiel mi kriple kaj la akuzativo lamas... Tamen... estis multaj kiuj parolis treege belsone, agrable kaj perfekte la lingvon karan de l' homaro...

Nome tiajn mi serĉis, por ke, aŭdante pliperfektan parolon, ankaŭ mi spertiĝu... Tiam mi tre malmulte parolis, respondante per mallongaj frazoj. Ĉar mi ne volis plenigi, remburi la orelojn de miaj dumvojaĝaj konatuloj per diversaj lingvaj kriplaĵoj kaj ridige erarplenaj frazoj...

Kaj tutajn aŭditajn frazojn mi parkere ripetis kaj enskribis. Dume, ekstere la naturo kuris, kaj postrestis... Niaj malsataj okuloj — senfundaj faŭkoj — senorde, frande englutis montojn, riverojn, kastelojn kaj survojnajn krucumojn...

Ĉu sonĝo — ĉu realaĵo?...

— Kaj Nürnberg?

— O... estas ankoraŭ tempo!...

Ĉies okuloj sopiras la esperantan pilgrimejon...

* * *

Pluva senĝoja tago. Tamen la animo festas, la okuloj kaj la koro festenas... La stomako silentas — —.

Mi vivas per okuloj, per oreloj...

Mi volas ĉion vidi kaj ĉies parolon aŭdi —. De malproksime videblas turoj, kamentuboj fabrikaj, altaj sonorilejoj preĝejoj kaj ree turoj pecigantaj la grizan senĝojan sulkiĝintan ĉielon... Kvazaŭ ĝi protestas, kontraŭstaras ke Nürnberg donas akcepton al ĉiuj gemonduloj — al ĉiuj pacaj batalantoj...

Nebulo... Pluvo... Pluvetas...

— Ĉu ni jam alvenis?

— Jes, ankoraŭ iom!...

— Sankta Madonna, ... Sankta Madonna!

— Panjo mia! ... Ni jam alvenis! ...

(Daŭrigota)

In memoriam

Al Angel Nikolov

Antaŭ kelke da tagoj korporema sciigo trafis min: Anĝelo Nikolov mortis.

Mi nun memore revidas lin: mi vidas lian vizaĝon, sur kiuj oni povus tuĵ legi la tutan bonecon kaj simplecon de lia animo,

mi vidas lian larĝan staturon, la manojn maldelikatajn kaj fortikajn pro la multa laborado . . .

Mi estis tiam nova esperantisto, kaj leginte la fabelajn priskribojn pri samideana vivo, pri tutmonda amikeco, pri la nova sento, kiu animis parton de l' homaro, mi volis tuj eniri tiun kunvivon, preni parton en ĝi. Mia plej granda sopiro estis la mardo — la tago, kiam tiutempe la samideanoj en Sofia faris siajn semajnajn kunvenojn. En ili okazis mia inicio, la plej kara en mia vivo. Tie mi ankaŭ konatiĝis kun Anĝelo.

Ni rapide intimiĝis. Mi plej ŝatis lin, ĉar li neniam estis ĝenata kaj sata je la esperanta parolado. Laŭ mi, tio estis la plej bona kvalito de esperantisto. Sed eĉ pli alloga por mi estis lia persono, ĉar li tiam estis bibliotekisto de la Laborista grupo. Tiam mi serĉis esperantajn librojn, kiujn mi dum ĉiu libera momento legis. La konatiĝo kun tia samideano estis por mi bonevena, ĉar per ĝi mi subite havis je mia dispono tutan trezoron da esperanta literaturo.

La negranda biblioteko de tiu grupo, kiu ne plu nun ekzistas (pro la poste venintaj cirkonstancoj — la politikaj tumultoj en la lando) — tiu biblioteko estis por mi preteksto por ofta renkontiĝo. Ĝi estis formita el libroj, kiujn donacis al la grupo samideanoj — laboristoj. Kaj multaj el tiuj libroj surhavis surskribon: Angel Nikolov.

Li distingiĝis per sia precizeco kaj laboremo.

Estis aŭtuna vespero. En la laborista klubejo estis tiel agreable kaj hejme, nur ni ambaŭ mastrumis tie. Ni faris la nomaron de la tie troviĝanta havaĵo de la biblioteko. Lampo aŭ kandelo mankis, sed la esperantaj libroj, jam eluzitaj, estis tiel konataj al ni, ke ni ne bezonis legi la titolojn, ni ilin sciis parkere.

— Nu, mi diris, ni morgaŭ faru tiun laboron, nenion plu mi vidas.

— Ah, morgaŭ, kiu scias, ĉu ni morgaŭ povos. Ĉio povas okazi . . . Kaj li daŭrigis la laboron en la mallumo.

La postajn tagojn la polico sigelis la ejon, pro suspekto pri konspirado kontraŭŝtata. La esperantan bibliotekon mi ne plu vidis. —

Post kelka tempo mi havis novajn amikojn. Mi akiris ilin per la jena maniero. En esperanta kunveno mi deklaris, ke mi formas malgrandan esperantan ĥoron. Tuj kelkaj kantemuloj aliĝis. Anĝelo, kiu havis belan kaj fortan, kvankam ne prilaboritan voĉon, estis la kerno de la ĥoro. Al li mi ŝuldis la aliĝon de la ceteraj ĥoranoj — laboristoj.

Nun ni preskaŭ ĉiuvespere kunvenis en mia hejmo. La plej fidela vizitanto estis Anĝelo. Li bone lernis pli ol dek kantojn. Mi prenis ilin el la „Internacia kantaro“ de Paul Bennemann kaj parte el la revuo „Literatura Mondo“. Laŭ insistado de Anĝelo, ili ĉiam devis esti diversnaciaj. Tielmaniere ni lernis polan, germanan, turkan, francan, hispanan, svedan, italan k. a. popolkantojn. Satata kanto estis ankaŭ la „Nova sento“, teksto de Julio Baghy.

La duan voĉon de tiu kanto mi volis akiri de Budapesta samideano, al kiu mi speciale por la afero skribis, sed la malpacience atendita de ni respondo diris, ke ankaŭ en Budapesto mankas la dua partio. Tiam, laŭ nia peto, sro g. Atanasov, nia konata samideano pianisto, mem verkis la duan partion de la kanto. Tiam mi faris la konstaton, ke inter la laboristoj-samideanoj Baghy estas la plej populara kaj ŝatata poeto.

Tiuj kantoj estis ofte kantataj ekskurse kaj aliokaze; dum ŝippromeno sur Danubo, dum la XI Bulgara kongreso en Ruse, kelkaj samideanoj certe rememoros la kantadon de Anĝelo.

Tiu tempo estas por mi ĉiam tre kara.

La idealismo de Anĝelo estis granda. Li oferis sufiĉe grandajn monsumojn por diversaj laboristaj entreprenoj, organizaĵoj, kulturaj aferoj, kaj li mem vivis malriĉe. Li estis simpla laboristo.

Mi rememoras, ke li foje montris al mi libron. Ĝi konsistis nur el unu frazo el la Evangelio, tradukita en ĉiuj kvincent lingvoj en la mondo. Ĝin li havis kaj konservis kiel donacaĵon de dankema hungara samideano, kiun Anĝelo estis helpinta, kiam tiu, revenante al sia patrolando, devis tute sen rimedoj resti en Sofia, en la mezo de sia vojo, ne povante pluen iri. Estis Anĝelo, kiu la sola inter la Sofiaj samideanoj donis al la fremdulo monon sufiĉantan por la hejmeniro. —

Angel Nikolov antaŭ du jaroj iris al Belgio. Tie li laboris en la karbominejoj ĉe kondiĉoj plej mizeraj kaj hontaj por la indeco de la homa estaĵo. Tie li akiris la flavan malsanon — la ftizon. Helpite de belgaj kaj germanaj laboristoj — samideanoj (eksterlande li nur kun samideanoj povis interrilati, ĉar krom sia gepatra lingvo Anĝelo scipovis nur Esperanton) — li revenis Bulgarian, por tie post unu jaro da peza malsanado morti.

Lia enterigo estis modesta: kelkaj parencoj kaj amikoj sekvis la ĉerkon, kie kuŝis la nobla koro.

Dormu, ripozu en paco, nia neforgesebla Anĝelo!

A. Grigorov

La paroloj de l' Sperto

El la „INTIMA LIBRO DE LA VERDURBAJ ESPERANTISTOJ“ de Ada.

Vera Esperanto-aganto estas tiu, kiu estas preta daŭrigi sian laboron eĉ se li vidus sin tute sola sub la verda standardo, post kiam li estis jam sekvita de granda anaro.

*
Ne trotaksu la movadon, por ne trosenti elreviĝon.

*
Ne estas bona esperantisto tiu, kiu aliĝas al Esperanto nur pro ĝiaj sukcesoj. Fidinda estas nur tiu, kiu aliĝas por krei sukcesojn.

*

Se el cento da esperantistoj ĉiu opinias, ke la ceteraj 99 personoj sufiĉe laboras por la movado kaj do lia laboro ne estas bezona — certe la afero ne povos fari eĉ unu paŝon antaŭen.

Sed, se el cento da esperantistoj ĉiu opinias, ke la ceteraj 99 kredeble ne faros ion, kaj se li deziras, ke restu io farata almenaŭ de li — tiam certe la afero tuj progresos per cent paŝoj.

*

Granda forto kaŝas sin en la multo de la unuoj — nur se ĉiu unuo konscias sian signifon kaj konscias la forton de la unuigita tuto.

*

La vera ideeco estas ekkonebla en la momento, kiam la afero tuŝas la monujon.

Ĝis tiu momento ĉiu aplomba parolo pri la ideo estas nur sensignifa deklamo.

*

Ne diru: „kial tio aŭ tio ne estas ankoraŭ kreita en Esperanto“, „kial tio aŭ alia verko ne estas ankoraŭ tradukita“, „kial la esperantistoj ne havas ankoraŭ tion aŭ tion“ k.t.p.

Kio ne ankoraŭ estas farita, ĝi estos de ni farata.

Ja por tio ni estas en la movado!

*

La Esperanto-movado ŝuldas siajn sukcesojn al personoj, kiuj preferis mem labori, por krei sukcesojn, ol atendi sukcesojn de aliaj.

*

Théophil Cart diris: „Oni facile sukcesas fari el mil esperantistoj du aŭ tri milojn, sed estis miraklo fari el unu esperantisto du, el du tri“.

Jen paroloj, kiuj devas elvoki mediton.

*

La hazardaj elementoj en la Esperanto-movado estas balasto, kiu portas pli da malutilo ol da utilo. Ili kreas la trompan kredon pri kvanta forto kaj per tio povas decidigi riskan entreprenon, kiu postulas nur seriozajn subtenantojn.

La entreprenoj iniciatataj devas laŭi la efektivan forton de la movado — alie ili fiaskas.

*

Ofte hazarda sukceso estas malsukceso.

*

Amiko plendis al mi:

— Mi ekloĝis en urbo, kie neniu sciis ion pri Esperanto. Mi ekagis kaj malfermis kurson. Malfeliĉe, pro manko de helpo flanke de l' aŭtoritatoj, mi malfermis ĝin tro malfrue, mi perdis la oportunan sezonon. Se mi estus povinta bontempe aranĝi ĉion, mi havus kurson kun cent personoj. — Kian sukceson mi perdis!

Mi respondis :

— Vi ne tre bone mezuras la faktojn kaj la eblojn. Ĝuste nun vi povus atendi sukcesan rezulton el via penado, ĉar tio estos natura. Vi estas unuo kaj ne povus asimili centon da personoj. Kaj neasimilitaj kursanoj estas perditaj por Esperanto: baldaŭ tiaj kursanoj forlasas la kurson, kaj en ĝi restas nur malgranda kelko; tiam en la animoj de la restintoj aperas la demando: „Kien foriĝis la multaj ceteraj?“ Tio estas komenco de dubo malutila... Kaj poste, el la personoj, kiuj eklernis kaj forlasis la lingvon, certe neniu vi povos facile altiri duan fojon al denova lernado... Se vi havus, tamen, en la komenco nur kvin kursanojn, tio estas alia afero: ĉar ili venis en malfavoraj cirkonstancoj, certe ili estas seriozaj, fidindaj kaj esperigaj. Kun ili vi pli facile povos labori kaj ilin asimili. Post unu jaro do en la urbo estos kune kun vi ses personoj kiel vi. Tiam la sesopo povos facile asimili ankoraŭ tridek novajn adeptojn: ĉiu el ĝi havos la penon influi al kvin personoj kaj enmovadigi ilin. Post tio jam venas la ŝanco asimili centon. — Tio estas la natura vojo de la movado, kaj laŭ ĝi estas atingeblaj daŭraj kaj firmaj rezultoj. Alie — vi havos bruon sukceson por mallonga tempo: brulo de pajlo.

Mia amiko kvazaŭ komprenis.

Sed mi vidis, ke tamen li ne povas ĉesi bedaŭri pri la perdita cento.

Juna li estas kaj ne ankoraŭ sperta.

*

Kune kun la kresko de organizaĵo devas kreski ankaŭ ĝiaj bezonoj.

La bezonoj estas kvazaŭ kuncentraj cirkloj ĉirkaŭ la organizaĵo: atingante la malpli grandan, ĝi ekstaras antaŭ pli granda.

La bezonoj de sana organizaĵo devas esti ĉiam pli grandaj ol ĝiaj rimedoj.

Organizaĵo ĉesas progresi en la momento, kiam ĝi povus diri pri si: Miaj enspezoj plene sufiĉas por kontentigi ĉiujn miajn bezonojn“.

*

En internacia kongreso ni estis. Ni sidis, kompanio de samideanoj el diversaj landoj, ĉirkaŭ tablo en bierejo kaj amike interparolis. Ĉiu komunikis faktojn pri sukcesoj de Esperanto en lia lando.

Unu sciigis, ke ministro esprimis favoran opinion pri Esperanto.

Alia — ke eminenta sciencisto akceptis la titolon de „honora prezidanto“ de l' enlanda esperantista organizaĵo.

Tria — ke en lia lando estas enkondukota Esperanto en la lernejojn, tamen mankas instruistoj, ĉar ja la esperantistoj tie estas tro malmultaj. Fakte, la instruado ne estos farata, sed certe la decido mem estos grandega sukceso...

Kvara . . .

La ĉeestantoj aŭskultis kaj ĝoje interjekciis.

Kontraŭ mi sidis grizharulo, kiu tamen restis trankvila kaj senemocia.

Kiu scias? Eble dum sia spertado li estis vidinta jam multajn sukcesojn kaj la nunaj sciigoj ne impresis lin . . . Eble li estis aŭdinta laŭdojn pri Esperanto de eminentuloj, kiuj post kelkaj tagoj demandis: „Esperanto? Kio estas Esperanto?“ — Eble li renkontis profesorojn, hodiaŭ favoraj al Esperanto, kaj post unu tago esprimantaj tute kontraŭan opinion. Aŭ scienculojn, kiuj kompetente klarigis al la nekleraj: „Jes, la internacia signaro, kiun oni nomas per la nomoj Esperanto aŭ Volapük, estas jam tre vastigita“ . . .

Eble . . .

Sed tiu samideano ne montris ekstazan ĝojon, kiam la samideanoj raportis pri la sukcesoj.

Fine iu samideano, el mi ne scias kia lando, diris tute modeste:

— Kaj ĉe ni . . . ĉe ni la vasta publiko jam ekkutimis diri „Esperanto“ anstataŭ „Eksperanto“. Malfacila estis la vojo ĝis tiu stato, vere . . .

La sidantoj ĉirkaŭ la tablo ekrigardis sin reciproke. En ĉies okuloj rido brilis, tamen oni sukcesis deteni la ridon. — Samideana delikateco!

Nun tamen la grizhara samideano enmiksiĝis:

— Certe, via sukceso estas plej valora. La radikoj de Esperanto devas esti jam penetrantaj en bona grundo ĉe vi . . . Sed malfacile oni komprenas tion . . .

*

Ofte estas pli malfacile savi Esperanton de malsperta defendo, ol de akra atako.

*

Bona propagandisto devas scii, kiam li ne devas respondi al atakoj.

*

Ne kapabli paroli kaj kapabli ne paroli estas du malsamaj aferoj.

La dua estas tre valora kvalito por bona propagandisto.

*

Ne povas esti bona esperantisto tiu, kiu povas preterpasi sur la strato egalanime renkontatan verdstelulon.

*

Esperanto ne bezonas tiun, kiu ne bezonas Esperanton.

—————

Letero el Esperantio

Unu tagon mi ricevis inviton por la Tria distrikta esperanta konferenco, kiu okazis je la 2 de Majo en la vilaĝo Sadovec. Kiam mi ricevis la inviton, mi decidis nepre iri. Unu matenon mi forvojaĝis al Sadovec. Mi estis sola, kiam mi alvenis al la stacidomo D. D. Mi vidis multe da homoj, kiuj malsupreniris la vagonaron. Sur iliaj brustoj mi rimarkis esperantajn insignojn. Mi salutis ilin kiel konatajn. Mi konas ĉiujn: ja ili estas miaj gefratoj. Ni ĉiuj ekveturis al Sadovec. Dum la tuta vojo ĉion, kion ni vidis, ni rapidis nomi en Esperanto. Ĉiuj estis gajoplenaj, uzante la karan lingvon.

Ni alvenis en la vilaĝon gajaj kaj kontentaj. Ĉiuj lokaj esperantistoj atendis nin apud la lernejo. Kiam ili vidis nin, ili levis flirtantan verdan standardon kaj per alta kaj gaja voĉo salutis nin. Niaj vizaĝoj ekbrilis. Ni ankaŭ salutis ilin. Post la renkonto ni iris en la salonon, kie devis kunsidi la konferenco. Tie jam estis multe da esperantistoj. Ĉiuj estis gajaj kaj el iliaj okuloj brilis idealismo kaj preteco por batalo. La konferenco komencis kun granda humoro kaj kun plezuro mi aŭdadis kiel flue sonas Esperanto el la elokventaj buŝoj. Tiam mi diris al mi: „Esperanto estas pli flua ol la bulgara lingvo!“ Dum la tuta konferenco mi aŭdis nur esperantan parolon.

Post la konferenco ni promenadis tra la vilaĝo. Mi vidis firmon „Razejo Esperanto“, poste ankaŭ „Salono kaj legejo Esperanto“. Unu vilaĝano, kiu nin renkontis, salutis nin en Esperanto... Mi ekhavis la iluzion, ke ni troviĝas en Esperantio. Kaj ja ĉu mi ne estis prava? Niaj konferencoj estas malgrandaj pordoj, per kiuj ni iras en la vastan Esperantion, kiun ĉiuj sopiras kaj en kiu ĉiuj vivas kiel gefratoj. Mi petas ĉiujn esperantistojn kaj esperantemulojn, kiuj deziras viziti la vastegan Esperantion, antaŭe ĉiam veni al niaj malgrandaj, sed despli intimaj konferencoj, kie ili povos preĝigi sin por la pli grandaj.

K. Konov

— Estas komencita kolekto de mono por la fondo „Esperanto-hejmo en Sofia.“ Tiu fondo ĝis nun disponas je ĉirkaŭ 10,000 levoj. En Sofia elektiĝis komisiono zorgonta por la sukcesigo de la afero. La samideanoj kaj la grupoj estas petataj sendi ĉiujn sumojn kolektitajn por la fondo al la Societo, a. d. r.: str. Car Boris, 69 — Sofia.

Redakcia Komitato:
Asen Grigorov — Zahari Zahariev

Por Universala Esperanta Bibliografio

La Itala Katedro de Esperanto organizas „Centra Esperantista Bibliografia Oficejo'n“ por montri al la mondo la gravecon de la esperantista eldonaĵaro kaj por valorigi inter la kulturuloj la eldonaĵaron mem.

La C. E. B. O. pro tio:

- I. aranĝas kiel eble plej kompletan katalogon de la ĝis nun publikigitaj libroj, broŝuroj (en kiu ajn lingvo eldonitaj), revuoj, ĵurnaloj, k. t. p. ne notitaj en la verko:
„Katalogo de la biblioteko (1888—1911) de Georg Davidov-Saratov. — Wolfenbütel (Germanujo), Heckners Verlag, 1911, 8^o“;
- II. publikigas ĉiudumonate kiel aldonon de la Itala Esperanta Revuo „Bultenon de tutmonda esperantista bibliografio“.

Ĉiu vera esperantisto komprenas la gravecon de la afero kaj sendube li fariĝos kunlaboranto sendante al la C. E. B. O. (Sidejo: Venezia (Italio), S. Nicolò di Lido, 39 B.) la liston de ĉiuj tiuj esperantaj libroj, kiujn li povas koni. Kaj ankaŭ la aŭtoroj, la tradukintoj kaj la eldonistoj estas interesataj sendi al C. E. B. O. se ne kopion de la de ili eldonitaj libroj almenaŭ kompletan kaj akuratan liston de la samaj.

La listo devas esti aranĝata laŭ jena bibliografia metodo:

1. Nomo kaj antaŭnomo de la aŭtoro originala. (Se la nomo de la aŭtoro mankas ĉu en la titolo, ĉu en la antaŭparolo, ĉu en alia parto de la libro, oni devas kopii la titolfolion laŭ la sekvanta n^o 2).
2. Preciza titolo de la verko,
3. Eventuala tradukinto,
4. Eldono,
5. Loko, eldonejo, presejo, jaro, formato en centimetroj, kvanto de la paĝoj,
6. Noto ĉu la libro enhavas ilustraĵojn,
7. Eventuala kolekto,
8. Prezo se ĝi estas konebla.

N.B. La titoloj en nelatinaj karakteroj devas esti transskribataj per la esperanta alfabeto; kaj ankaŭ oni petas skribi kiel eble plej legeble.

Nature la Bulteno, kune kun la titoloj de la novaj eldonaĵoj publikigos iom post iom ankaŭ tiujn de la malnovaj por kompletigi post kelke da tempo la tutmondan esperantistan bibliografion.

La kunlaborantoj ricevos senpage la Bultenon kaj en la fino de ĉiu jaro iliaj nomo kaj adreso estos publikigataj en aparta listo.

La Itala Katedro de Esperanto per la nuna komunikado sin turnas al ĉiuj samideanoj, societoj, izoluloj por ke la grava celo de la esperanta bibliografio ludu fine sian rolon en la esperantista movado.

Itala Katedro de Esperanto

Firenze 18, via dei Neri 6

